ya en col ✓ ago. 1996


# AVANCO

2/96

Majo–Aŭgusto
(VIII-a jaro, Nro. 1)

Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio


E N H A V O


ANTAŬENIGI LA MOVADON 3-6

*Julián Hernández Angulo*

5-a Nacia Seminario por Instruistoj 7

BUNTA KAJ UTILA LAŬ ĈIES OPINIOJ

*Héctor Jiménez Batista*

MANIFESTO DE PRAGO 8-9

Kronologie: antaŭ, dum kaj post la UK

INTENSAJ TAGOJ DE NIAJ REPREZENTINTOJ 10-12

El informo de *Julián Hernández Angulo*

Jen nia historio

SUKCESOPLENA EPOKO 13-16

*Juan Ramón Rodríguez Gómez*

# Estimataj:

Karaj geamikoj, pro diversaj kialoj, eĉ personaj problemoj de la redaktoro, tiu ĉi numero ne aperis en aŭgusto, kiel programite, sed fine de novembro. Mi pardonpetas kaj certigas la trian numeron (fine de decembro, laŭ plane) preta ĉe viaj manoj ĝustatempe.
En tiu ĉi numero, la propono estas pripensi, analizi kaj... reagi.
Atendante ke ĝi plaĉos al vi.

Alexis
la redaktoro



## NACIA ESTRARO

*Julián Hernández Angulo
Prez., Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.
*Maritza Gutiérrez González
Ĝenerala Sekr., Kontrolas internan agadon.
*Alberto Rodríguez Pineda
Financoj, k. administrado de la Centra Oficejo.
*Héctor Jiménez Batista
Instruado k. ILEI-Sekcio.
*Juan Ramón Rodríguez Gómez
Intern. kaj Pub. Rilatoj, Historio kaj Libroservo.
*Pedro Fernández Rodríguez
Kulturo. Artaj kaj klerigaj aranĝoj.
*Alexis Otero Castellón
Informado. Ĉefredaktoro de Avanco, Noktuo k.Universo.

Komisiitoj
*Martha Alonso
Kultura kunordigo.
*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.
*Alberto García Fumero
Scienco kaj tekniko.
*Miguel A. González
Membroj subtenantoj.

VIII-a jaro, nro. 1 (2/96, maj.-aûg.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas Kuba E-Asocio/PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo/Telefonnumeroj: 40-1364 k. 40-4484/ Fakso: 53 7 33 87 29 / Ĉefredaktoro: Alexis Otero Castellón / Grafika aranĝo kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez / Kunlaboris: Julián Hernández, Héctor Jiménez, Roberto Molina kaj Alberto Rodríguez / Prezo: 1.00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj/Reproduktado permesata (Bv. indiki la fonton kaj sendu du ekzemplerojn al la Redakcio).

# ANTAŬENIGI LA MOVADON

(El la parolado de Julián Hernández Angulo, Prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, dum la solena fermo de la IIa Nacia Kongreso de KEA, la 9-an de marto 1996, en la muzeo pri sciencoj Carlos J. Finlay, de la ĉefurbo.)

Dum la Kongreso, la kongresanoj dividis spertojn, interŝanĝis opiniojn, lanĉis iniciatojn, parolis E-on kaj tiuj diversaj aranĝoj kaj agoj kiujn ni faris, dum tiuj tri tagoj, plifortigis nian movadon kaj ebligis la plenumiĝon de la celoj de la Kongreso. Fakte, la Kongreso estis granda festo kiu arigis la plej aktivajn esperantistojn de la tuta lando. Je la fino, ni devas analizi kaj mediti pri kelkaj gravaj labor-aspektoj kiuj ebligis nin antaŭenigi la movadon.

## ORGANIZA VIVO DE LA ASOCIO

(...) ke ĉiuj aktivuloj, ke ĉiu ordinara e-isto, ke ĉiuj estraranoj en provincaj kaj municipaj filioj konsciu ke estas ege grava la organiza laboro.. Ke ĉiam oni devas plani por ke la laboro estu sukcesa. Eĉ, se estas du esperantistoj kiuj deziras avancigi la movadon ie, tiuj du esperantistoj devas plani la laboron, ĉar fakte nur tiel, ni povas sukcesigi la laboron.

Ankaŭ, memoru ke la pasinta jaro la komitatanoj -kaj tion ni disvastigis al la diversaj esperantistoj tra la tuta lando- aprobis kategoriigon de membroj. Kaj tiu (...) celas ke ĉiuj e-istoj fakte plialtigu la lingvan nivelon, kaj pli agu por la evoluo de E-o en Kubo. Tiuj estas la celoj de la kategoriigo de membroj, k. mi petas al ĉiuj estraranoj de municipaj k. provincaj filioj klopodi plenumi ĝin, tiel ke nia Asocio estu pli kvalita.

## KIOM GRAVA ESTAS INSTRUADO!

Ni adaptiĝas al niaj nunaj cirkonstancoj; jam niaj regulaj kursoj ne estas tiom fruktodonaj kiaj ili estis antaŭ kelkaj jaroj. Tamen, vi konsciu ke ni multe pli devas labori por sukcesigi ilin, kaj ni multe emfazis ke ni devas labori sur la psikologia aspekto, ni devas atenti niajn lernantojn, ni devas atenti niajn esperantistojn, ni devas atenti niajn instruistojn. Kaj ankaŭ la instuistoj estas gravaj motoroj por nia movado. La instruistoj nutru la mem-estimon de la gelernantoj, tiel ke ili restu inter ni, tiel ke ili pli studu

nian lingvon, tiel ke ili konatiĝu kaj informiĝu pri la historio kaj la kulturo de E-o. Tiel ke ili fariĝu veraj e-istoj, kiuj kapablas labori malgraŭ diversaj baroj kaj kapablas venki plej obstinajn kaj altajn barojn.

## PRIORITATI INFORMADON

(...) por la jaro 1996, ni (...) decidis prioritati la kampon informado, ĉar fakte ni multe devas labori por ke ĉiuj kubanoj informiĝu pri E-o, kio estas E-o, kiuj estas la celoj de E-o (...)

Ni ne timu propagandi E-on, ĉar E-o ja valoras. Ni profitu niajn amaskomunikilojn, (...) niajn amikojn, niajn parencojn, niajn kolegojn, ĉiujn personojn kiuj ĉirkaŭas nin, por ke ili sciu kio estas E-o. Konsciu ke tio estas kampo kiun ni devas multe prilabori por (...) pli avancigi nian movadon. Ankoraŭ estas pluraj personoj, malgraŭ nia daŭra laboro, kiuj ne scias kio estas E-o, k. se ekzistas tiuj personoj (...), tio signifas ke ni ankoraŭ multe devas labori por ke pli kaj pli da kubanoj, kaj ne nur kubanoj (...), konatiĝu kun E-o, informiĝu pri siaj noblaj celoj.

Ni, kiel asocianoj, ankaŭ devas garantii la eksterigon de nia movado. Ni ne povas fermi nin ene de niaj muroj, ene de niaj pordoj kaj fenestroj. Ni daŭre devas eksterasociigi nian laboron. Teni viglajn la publikajn rilatojn, kontakti ĉiujn instituciojn, teni viglajn la internaciajn rilatojn, kaj nur tiel ni povas informi al la mondo (...) kion ni faras kaj kiom multe kaj eĉ modeste ni kontribuas al la evoluo de E-o (...)

## ESPERANTO: LINGVISTIKA, SOCIA KAJ KULTURA FENOMENO

(...) vi scias ke Esperanto estas lingvistika, socia kaj kultura fenomeno. Pro tio, ni devas pli kaj pli labori sur tiuj ĉi kampo.

E-isto aŭ e-istoj, parolu E-on unue, pro tio ni instigas vin, spronas vin al daŭra studado de E-o, al daŭra perfektigo de E-o. Pasas la tempo kaj ni okazigas diversajn aranĝojn, plaĉas al ĉiu e-isto, al ĉiuj aktivuloj, al ĉiuj naciaj estraranoj, ke kiam ni renkontas niajn amikojn, niajn aktivulojn, ili

pli parolu E-on, pli montru ilian scipovon rilate al la IL. Komprenable, tio postulas sindonemon, sindediĉon kaj daŭran studadon.

Ni devas flegi niajn atentojn en rilato kun la laboro kun profesiaj kaj amatoraj artistoj. Fakte, estis brilega ideo ke unu el la programeroj de la Kongreso estu la deklama konkurso. (...) fakte tio estas kontribuo de la kubaj esperantistoj al la internacia E-kulturo. Tio, kion ili faris, multe povas helpi nin en niaj (...) aranĝoj; tio ankaŭ stimulas la aliajn e-istojn labori sur tiu kampo.

Kiu ajn povas fari ion, nur bezonatas ke tiu persono havu amon, ke tiu persono deziru fari ion; komprenehle, tiuj personoj poste ricevos rekomendojn, konsilojn por perfektigi la laboron. Sed tio multe, multe helpas la kulturan profilon de la E-movado en Kubo. Jam dum la du pasintajn jarojn, ni povas diri, kelkaj esperantistoj komencis labori la beletran kampon. (...) ni havas ja kelkajn esperantistojn kiuj ion faras kaj eĉ sendas siajn verkojn al la internacia E-komunumo.

Ni profitu la rimedojn kiujn la kuba registaro, kiujn la kuba ŝtato donas al ni. Ni profitu la kulturajn instituciojn, la sciencajn instituciojn por (...) pli kaj pli atingi superajn celojn rilate al la kultura kampo.

## ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO (ST)

(...) KEA iom kaj eĉ multe faras rilate al la apliko de E-o en ST. Konsciu pri la laboro kiun ni faras sur la instrua kampo, ĉar ni daŭre klopodas perfektigi la laboron de niaj instruistoj. Inter ni, ekzistas Kuba E-o Medicina Agado, t.e. KEMA, kiu jam okazigis du sciencajn renkontiĝojn (...). Temas pri la renkontiĝo de medicinistoj, kadre de la 15-a datreveno de KEA kaj pri la apliko de E-o en ST, dum la pasinta jaro.

Ankaŭ sur tiu ĉi kampo ni devas labori ĉar (...) la nuntempa mondo estas de ST (...). Jam ni havas niajn instruistojn, niajn inĝenierojn, niajn ekonomikistojn, ni havas la Jumajho-terapion k. la Homeopatiajn kuracistojn. (...) tio diras al ni ke ni iras sufiĉe bone sur tiu ĉi kampo, sed ke ni daŭre devas flegi tiun laboron.

La strategio de UEA por la Dua Jarcento estas: disvastigo, utiligo kaj edukado al tutmonda konscio. En rilato kun tio, ni devas daŭre agi por disvastigi nian movadon, por utiligi E-on, (...) konscii ke ni estas parto de granda familio, (...) parto de la internacia E-komunumo, kaj ke (...) ni devas kontribui al la prestiĝo kaj daŭra evoluo de nia movado.

(...)

## SUBTENON DE LA KUBA REGISTARO

Malgraŭ la ekonomiaj malfacilaĵoj, ni (...) ĉiam havas la subtenon de la kuba registaro, de la kuba ŝtato, ili ĉiam helpas, ili ĉiam favoras nian agadon. Nur ni devas frapi la pordojn de tiuj institucioj, kaj ĝis nun ni ĉiam havas pozitivan respondon, pozitivan reagon. Ni danku la helpon de la diversaj amaskomunikiloj, de la radio-stacioj kiuj daŭre propagandis nian kongreson kaj kiuj daŭre propagandas nian agadon (...)

(...)

## PLI KAJ PLI, ANTAŬEN...

(...) ni petas ke vi ĉiuj revenu hejmen sufiĉe feliĉaj ĉar vi havas gravan taskon. Temas pri la evoluo de KEA, temas pri la prestiĝo de nia laboro. Mi petas al ĉiu filio kiu elstaras en la laboro, daŭre teni tiun kondiĉon, kaj al tiuj filioj, kiuj havas kelkajn problemetojn, klopodi senigi tiujn problemetojn tiel ke la E-movado en Kubo pli kaj pli vivu, pli kaj pli sukcesu. Ni zorgu la harmonion inter la esperantistoj, ni zorgu la amikecon inter la esperantistoj, nur tiel la kuba esperantista movado estos vere movado, estos vere familio.

Nome de la NE de KEA, de ĉiuj membroj de la Komitato, ni deziras (...) ke vi portu belajn mesaĝojn, belajn ideojn al ĉiuj e-istoj kiuj ne estas inter ni hodiaŭ, sed kiuj ankaŭ laboras k. impulsas nian movadon.

(...)

5-a Nacia Seminario por instruistoj

# Bunta kaj utila, laŭ ĉies opinioj

*Héctor Jiménez Batista*

Inter la 4a kaj la 6a de julio, KEA okazigis la San Nacian Seminarion por Instruistoj. Ĉi evento estas jam tradicia kaj pere de ĝi ni havas la eblecon pretigi novajn instruistojn kaj ankaŭ kapabligi, ekde instrua kaj movada vidpunktoj, la jam ekzistantaj tra la tuta lando. Partoprenis la seminarion reprezentantoj el diversaj provincoj.

Dum la tritaga renkontiĝo, oni prelegis kaj pritraktis interesajn kaj gravajn temojn: **Kiel instrui laŭ komunika metodo, Kiel instrui ekspresan kurson, Al plifortigo de fonetikaj aspektoj de la lingvo,** Kiel grupigi **geinfanojn por reteni ilin en niaj vicoj,** Kiel **traduki esperante, k.a.**

Ankaŭ, oni aranĝis praktikajn lecionojn por partoprenigi kaj praktikigi la seminariitojn kaj, je la fino, oni aranĝis rondan tablon, kie oni analizis diversajn aspektojn rilatantajn la disvastigon de la Internacia Lingvo kaj la plifortigon de la E-Movado en k. eksterlande. La seminario finiĝis per arta k. kultura aranĝo, kiun partoprenis, aktive, ĉiuj seminarianoj.

Ni povas taksi la Seminarion sukcesa, ne nur laŭ la opinio de la organizintoj, prelegintoj kaj laboristoj ĝenerale, sed kio plej gravas, laŭ la opinioj de la partoprenintoj mem, anonime esprimitaj per enketilo.

Ni multe fidas je la bezono, taŭgeco kaj pozitivaj rezultoj por nia movado, de la okazinta kaj de la okazontaj similcelaj seminarioj.

# Manifesto de Prago

de la movado por la Internacia Lingvo Esperanto

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de E-o,
direktas ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizoj, kaj homoj de bona volo,
deklaras nian intencon firmvole plulabori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj
invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancoriĉan lingvon, E-o jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj k. kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvoinstruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. DEMOKRATIO. Komunika sistemo kiu tutvive privilegias iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da peno por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, E-o ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

*Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.*

2. TRANSNACIA EDUKADO. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lernejano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio k. politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lernejano kiu studas E-on lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

*Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.*

3. PEDAGOGIA EFIKECO. Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de E-o eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas E-on kiel kernan eron en kurso por la lingva konsciigo de la lernantoj.

*Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklojn por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.*

4. PLURLINGVECO. La E-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

*Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.*

5. LINGVAJ RAJTOJ. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la E-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj k. neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi k. pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

*Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.*

6. LINGVA DIVERSECO. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la E-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

*Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.*

7. HOMA EMANCIPIĜO. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, E-o estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo, projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

*Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.*

# Intensaj tagoj de niaj reprezentintoj

El informo de *Julián Hernández Angulo*

**12an de julio**

-Vojaĝo al Berlino, de Manuel Rodriguez, prez. de la ĉefurba filio, k. Julián Hernández, prez. de KEA.

**13an-19an**

-Restado ĉe e-familioj: Blanke, Heise k. Geedher.

-Kunsido de la Estraro en Postdam.

-Aranĝoj de e-istaj grupoj en Berlino, inter ili la Jaŭda Rondo, kune kun reprezentintoj de Germanio, Usono, Finnlando, Madagaskaro kaj Japanio.

**20an de julio**

-Vojaĝo al Prago. Aliĝo al la Kongreso:

-Unua sesio de la UEA Komitato:

1.- Enkonduko, akcepto de protokolo Tampereo, kontrolo pri plenumo de Tamperaj decidoj, raporto de estraranoj. Laŭ voĉdono de la komitatanoj, Michela Lipari anstataŭas Mark Fettes, kiu petis demision kiel Ĝenerala Sekretario. Li daŭrigas atenton de la Eksteraj Rilatoj.

2.- Kongresaj preparoj: starigo de komitataj laborgrupoj (financo, komitata labormaniero, membrovarbado k. kampanio por la jaro 2000. Elekto de Honoraj Membroj: S-inoj Marie Bartovská, Eli Urbanová kaj Eva Seemanova, el Ĉeĥio; S-ro Zef Mjeda, el Albanio, kaj Belka Beleva, el Bulgario. Analizo de la Manifesto de Prago. Raporto de M. Fettes pri la organizo de la Nitobe-simpozio.

3.- Aliĝpetoj, kunlaboraj kontraktoj: aprobo de Vjetnama E-Asocio kaj Bharata E-Federacio kiel membroj kaj akcepto de kunlaboroj kun Amikaro de Bruno Gröning, Handikapulo Tutmonda, Spiritistoj k. la Spirita Eldona Societo Lorenz.

-Interkona Vespero.

**21an de julio**

-Kongresa Malfermo (salutmesaĝoj de la ĉeĥa Prez., la Ĝen. Sekr. de UN, la Ĝen. Dir. de UNESKO, la Ĉefepiskopo de Prago k. la nepo de la majstro). Kongresa temo: "Kulturo, ĉu valoro aŭ varo?"

-Prezento de fragmentoj el La Unua Brandfaristo (de Leo Tolstoj), unua teatraĵo en E-o antaŭ cent jaroj.

-Legado de la Manifesto de Prago far M. Fettes.

-TEJO prezentas Pasportan Servon 96-97.

-Salutoj de landaj asocioj, i.a. KEA (M. Rodríguez)

-Diskuto kaj aprobo de la estrara raporto 95.

-Nacia vespero.

22an de julio

-Vizito al Libroservo de UEA kaj vendo de materialoj.

-Parolado kun Pascuale Zapelli.

-Partopreno en la prezento de Pasporto al la Mondo (ELNA-videokurso).

-Partopreno en kunsido de instruistoj de ILEI.

-Arta aranĝo niaflanka k. vendo de materialoj kiujn ni portis tien.

-Parolado kun s-roj Izao Carneiro, Frank Stocker (prez. de GEA), Fantom, Wells, Gunther Becker k. s-inoj Fransiska Reizel, kaj Marija Beloŝeviĉ.

-Kontakto kun la kuba ambasadejo en Prago.

23an de julio

-Partopreno en publika sesio de la Akademio de E-o (la tikla demando estis ĉu la Akademio nepre bezonatas)

-Deĵoro en la Amerika budo.

-Aniĝo al Komitata laborgrupo pri la interna labormaniero de la Komitato. Gvidantoj: Renée Triolle (vicprez. de UEA) k. M. Lippari.

-Ĉeesto al koncerto de Flavio Fonseca.

-Ankoraŭfoja prezento de niaj kantoj kaj vendo de la kubaj kasedoj. Nin akompanis brazilanoj kaj la pola E-radio registris la kantadon. Interparolo kun: Ronald Glossop, Irma Geikkila, Paul Gubbins, Rudy Hauger, geedzoj Miller, Alex Humet, kaj aliaj.

24an de julio

-Ekskursa tago. Vizito nia tra Prago.

-Ĉeesto en koktelo omaĝe al la 26a de Julio, invitite de la kuba konsulino. Deklamado de Georgina kaj kantado de Julián.

25an de julio

-Partopreno en la kunsido pri Landa agado, gvidata de R. Triolle kaj S-ro Jegorova.

-Partopreno en la kunsido de redaktoroj. Disdono de niaj bultenoj kaj

transdono de dankleteroj al kelkaj ĉeestintoj flanke de nia Asocio. Kuba publiko danko al redaktoroj daŭre sendantaj siajn publikigaĵojn al KEA.

-Parolado kun S-ino Lapenna kaj S-ro William Auld. Li speciale laŭdis la verktalenton de S-ro Alberto García Fumero

-Partopreno en la konversacia rondo (observado de la metodologion aplikatan)

-Komitata sesio (financo kaj administrado, elektoj, strategioj k. laborplano). Reelektiĝo de S-roj Harmon, Corsetti k. Fujimoto kiel anoj de la Elekta Komisiono.

-Recitalo de Georgina Almanza. (Ĝi inkluzivis latinamerikajn poemojn el sia espektaklo "Mi rompas mian rutinon", kaj monologon "Lordino Makbeto en koncertkafejo".)

-Ĉeesto en la kabareto de F-ino Barlaston.

-Kunsido kun Detlev Meijer.

-Partopreno en la kunsido pri Amerika agado, gvidata de R. Triolle kaj Atilio Orellana. Raporto de KEA pri sia agado, KUJK kaj labor de Briano Kroeger kiel kursgvidanto en kelkaj provincoj de la kuba insulo.

-Internacia Arta vespero (prezento de G. Almanza)

26an de julio

-Solena fermo (transdono de la kongresa flago al Adelajdo, kaj adiaŭaj paroloj fare de S-ro Lee Chong Jong).

Ĝeneralaĵoj

-Oficiala partoprenintaro en la Kongreso: 2 971 personoj el 66 landoj.

-Omaĝo al la centjariĝo de E-teatro, efektiviĝis riĉenhava arta programo.

27an de julio-2an de aŭgusto


-Ĉeesto en la 30a ILEI Konferenco (gvidata de F-ino Marija Belošević) kun kvindeko da e-istoj el 31 landoj.

-Inaŭguro gvidite de R. Triolle k. S-ro Bormann (prez. de la Akademio). Omaĝo al Eduard Symoens.

-Prelegoj de Till Dallenburg, Stephan Mac Gill k.a., pri la konferenca temo "Rimedoj por la bona lernado kaj memlernado de Esperanto".

-En la fina rezolucio, oni petas al UNESKO atenti la klerigan rolon de E-o por internacia kunlaboro kaj reciproka aprezo kaj protekto de ĉies kulturo.

Jen nia



Historio

**En la lasta eldono (aprilo/96), *Avanco* daŭrigis la publikigon de la Unua Skizo pri la Historio de la E-movado en Kubo. Tie aperis "De KEA al KEA", konsistinta de 1948 ĝis 1978. Nun, la** Sepa periodo: 1979-1990

# SUKCESOPLENA EPOKO

*Juan Ramón Rodríguez Gómez*

La 16-an de junio 1979, post sukcesa kurso, kie oni instruis la ingvon al centoj da komencantoj, fondiĝas -jam kun oficiala aprobo- Kuba Esperanto-Asocio (KEA). Estas elektita prezidanto la inĝeniero Andrés Rodríguez González.(1) Pri la afero, multe informis la gazetaro; i.a. Granma, Juventud Rebelde, Trabajadores,...(2)

Post la unuaj sukcesaj rezultoj, la lernejestroj kaj KEA-estraranoj serĉis variantojn por reteni finlernintojn. Tiucele, ludis grava, sed tre fulmrapida rolo, la tiam jusfondita Esperanto-Rondo de Centro Havano, kiu plenumis diversajn E-aranĝojn en la lernejo mem.(3)

En la unuaj jaroj de la nova KEA, ankoraŭ oni ne havis oficialan oficejon; provizora sidejo estis la domo de iama esperantisto, kaze ke en ĝi estu minimumaj kondiĉoj por gardi kelcenton da broŝuroj kaj revuoj, kaj kunveni la tiama estraro.

> Jam la 3-an de januaro 1983 oni malfermis la Centran Oficejon de la Asocio (Neptuno kaj Industria), kiu iom post iom fariĝis renkontiĝejo por aktivuloj, estraranoj, movadanoj: krom labori por Esperanto, ili ĉiuj praktikas la lingvon kaj ĝuas ĝin. (Tiel ankaŭ) oni eksperimentis diversmaniere, estiĝis lernejoj en aliaj provincoj kaj nia instrusistemo pliboniĝis.(4)

En la jaro 1983, krome, kadre de la 68-a Universala Kongreso, okazinta

en Budapeŝto (Hungario), KEA aliĝas kiel membro de UEA.

La disvastigo de la esperanto-movado tra la lando en tiuj jaroj kaj la sekvantaj havas la apogon de ĉiuj la amaskomunikiloj de la insulo: naciaj, provincaj k. municipaj radiostacioj, naciaj kaj provincaj ĵurnaloj, kaj kelkaj revuoj. Ekz.: Granma, Juventud Rebelde, Bohemia, Trabajadores, Filatelia cubana, Alma Mater, Normalización y metrología, Pionero, Radio Reloj, Radio Metropolitana....

Kio okazis poste estas konata de preskaŭ ĉiuj la kubaj esperantistoj kaj ne precizas detali ĉion ĉi tie. Estonteco, oni inkludos centoj da elementoj de tiu epoko, ŝarĝita de aranĝoj, kursoj preskaŭ tra la tuta lando, ekspozicioj, interŝanĝoj, propagando, eldonaĵoj, ktp.. Pro tio, tiu ĉi parto de nia unua skizo enhavos nur sinteze resumon de la plej gravaj aferoj.

Kómence de 1986, pro interna aferoj de la NE de KEA, oni decidas ŝanĝi la prezidantecon: Jesús A. Castillo Jiménez anstataŭas Andrés Rodríguez González. La nova prezidanto daŭrigas, pli aktive, la agadon de la Asocio tra la tuta lando, helpe de aliaj naciaj estraranoj.

Meze de tiu jaro, okazas Esperanta Teknika Konferenco en la Kongresa Palaco, kun la ĉeesto de Simo Milojević, Ĝenerala Direktoro de UEA. La konferenco inkludis ekspoziciojn kaj tri prelegojn faritajn de estraranoj de KEA: Andrés Piñera (vicprez.), Julián Hernández (edukado) kaj Maritza Gutiérrez (propagando).

1987 rezervas grandajn sukcesojn por nia lando: kadre de la 72-a UK, okazinta en Varsovio, oni aprobas la realigon de la 75-a UK en Havano; k. la 4-an, 5-an kaj 6-an de decembro efektiviĝas en la ĉefurbo la Unua Kongreso de KEA, kiu starigas antaŭ ni novajn perspektivojn; el kio fontis, kun ŝtata subteno, projekto efektivigi nialande la Internacian Konferencon Esperanto'88,

kies plej elstara rezulto estis la renkontiĝo inter reprezentantoj de Latinamerikaj Esperanto-Organizaĵoj kioebligis unuavice reciprokan interkonatiĝon kaj ankaŭ starigon de

kunlaboraj rilatoj ĉihemisfere. Mirigis ĉiujn nia sukceso rilate Esperanto-elsendojn per Radio Havano-Kubo, kiu fariĝis internacia tribuno de Esperanto en Ameriko (...).(5)

Por daŭrigi kaj plifortigi la propagandan kaj informan laborojn, la 16-an de junio 1989 aperas la oficiala organo de KEA: Avanco, kies celo estas oferti "(...) al nia esperantistaro umbilikan ligilon, nutrivan kaj dinamisman".(6) Ĝi fariĝas bildo kaj tribuno pri la kuba E-movado delonge revitaj. Antaŭe, KEA diskonigis sian agadon pere de la bultenoj Kariba stelo, Teknika bulteno (el la Sciencteknika Sekcio), La verda stelo sur la verda insulo (el la ĉefurbo), kaj aliaj notinformaj folioj.

La jaro 1989 vidas aperi, ankaŭ, speciala grupo por la disvastigo de la IL: Esperanta Literatura Tradukmetiejo (ELT), kiu funkcias sub la aŭspicio de la Tradukista Sekcio de la UNEAC.

La sukcesinta realigo de la 75-a UK en Havano -inter la 14-a kaj la 21-a de julio 1990- permesas diskonigi gravajn aspektojn de nia movado en- kaj eksterlande. La partopreno de la Ĉefkomandanto en la malfermo de la UK alportas specialan signifon kaj gravecon al la jara tutmonda renkontiĝo. Diversaj amaskomunikiloj raportas la fakton. Tiel estas la kazoj de Granma, Juventud Rebelde, Trabajadores, Resumen Semanal de Granma, la televido, Radio Reloj, ktp..(7)

Tuj post la UK okazas la 46-a Internacia Junulara Kongreso en Playa Girón -inter la 22a kaj la 28a de julio- kaj, samtempe, la 12a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj (ILEI), en la hotelo Hanabanilla (kie antaŭe oni fondis Internacian Esperanto Centron, sed bedaŭrinde ĝi ne sukcesis, ĉefe pro tio ke la ideo montriĝis tro revolucia kaj fariĝis nerealigebla. KEA eldonis kun turisma entrepreno faldfolion kiu trairis la mondon, sed reagoj ne alvenis. Tiel finiĝis bela projekto iel mortnaskita).

Pri la UK kaj IJK, la jurnalo el habanero donis sufiĉajn detalojn, en kvin longaj kaj sinsekvaj tutpaĝaj artikoloj. Pri la IJK kaj la Konferenco

de ILEI, bone raportis Tribuna de La Habana.

Kelkaj monatoj post la 75a UK, la tiama prezidanto de KEA, Jesús A. Castillo Jiménez, rezignas kaj, aŭtomate, anstataŭas lin la ĝis tiam vicprezidanto Julián Hernández Angulo, kiu daŭrigas la agadon de la Asocio kaj estras la preparlaborojn por la tre proksima jarkunsido de la Nacia Komitato, okazonta en Havano, la 28-an kaj 29-an de januaro 1991. Tiamaniere, konkludas tiu ĉi grava periodo de nia historio.

REFERAĴOJ


1. Alberto Fernández-Calienes: Notoj pri historio de la E-movado en Kubo (1904-1983), p. 10.
2. Persona arkivo de la aŭtoro.
3. Maritza Gutiérrez: "Ni jubilas", en Avanco, jaro I, n-ro. 1, la 16-an de junio 1989.
4. Idem.
5. Ibid., p. 4.
6. (S. A.): "Alpasen!", en Avanco, jaro I, n-ro. 1, la 16-an de junio 1989, p. 1.
7. Persona arkivo de la aŭtoro.


BIBLIOGRAFIO


- Fernández-Calienes, Alberto: Notoj pri historio de la E-movado en Kubo (1904-1983). Havano, 1983, ne eldonita.
- Kolakto de Avanco.
- Persona arkivo de la aŭtoro.


*(Proksiman numeron, finiĝos tiu ĉi serio dediĉita al la Unua Skizo pri la Historio de la E-movado en Kubo. Unu plian fojon, ni invitas vin elverŝi opiniojn pri la temo. Se vi deziras la tutan skizon, mendu ĝin al Libroservo de KEA kontraŭ 3.00 pesoj aŭ 3.00 USD. Tiu teksto aperis kiel broŝuro, sub la titolo La Esperanto-movado en Kubo, okaze de la IIa Nacia Kongreso de KEA, marto 96).*

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro